## [baveleto] publika honorigo de Zsofia Korody el Herzberg - la Esperanto-urbo

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH), DE-37412 Herzberg - la Esperanto-urbo
26.10.2010
Karaj,
estas granda ĝojo komuniki al vi, ke Zsofia Korody el Herzberg dum solena festo en la kavalira salono de la kastelo Herzberg am Harz ricevis publikan distingon por la pli ol sepjara honorofica aktiva agado sur la diversaj kampoj por Esperanto kaj la oficiala Esperanto-urbo Herzberg.

Urbestro Gerhard Walter emfazis la multflankan kaj senlacan agadon, ekz. por la GEA-filio por klerigado kaj kulturo, kiel prezidantino de AGEI, kiel komisiitino de GEA por instruado, organizantino por internaciaj lernejaj projektoj, por la sukcesaj ĝemelurbaj aktivecoj inter Herzberg kaj Gora/PL, pro la meritoj rilate al la enkonduko de Esperanto-ekzamenoj lau KER, kiel estrarano de ILEI, por la granda Esperanto-biblioteko en Herzberg, ktp.
La ĉefo de la Esperanto-urbo aparte dankis al Zsofia Korody kaj transdonis gratuldokumenton kaj ombrelon kun la bela surskribo "Herzberg ... la Esperanto-urbo". Ĉeestis nemalmultaj poltikistoj kaj reprezentantoj de aliaj asocioj kaj kulturgrupoj.
Gerhard Walter substrekis la valoron "Esperanto" por Herzberg kaj anoncis akceladon de la poresperantaj agadoj.
Jen bonaj ekzemploj: baldaua fondo de speciala Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg, starigon de tiel nomataj "kontinentaj Esperanto-domoj", ekz. "Azia Esperanto-domo".
Do, tio estas belaj kaj realigendaj paŝoj en ne tro fora futuro. Bv. serioze kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg!
Ni elkore gratulas al Zsofia Korody kaj deziras al ŝi bonan sanstaton, feliĉon kaj pluajn sukcesojn "sur la vere esperiga verda pado".
En la aldono vi trovas fotojn sub: [http://esperanto-urbo.de](http://esperanto-urbo.de) kaj tie sub: fotogalerio/j
Intertempe ankaŭ aperis gazetartikolo pri la honoriga evento, ankaŭ tio jam videblas sur nia hejmpaĝo!
Dankon!
Amike kaj samideane salutas, Petro Zilvar el Herzberg Harald Mantz el Osterode

## La 63a elsendo de Varsovia Vento

Saluton! Kun plezuro mi invitas vin aŭskulti la novan programon, en kiu inter alie sonraportoj pri la Tago de Diverseco en Varsovio kaj pri la Homara Festo en Francio, tre interesa intervjuo kun la aŭtoro de "La danĝera lingvo" Urlich Lins, muzika intervjuo kun Kapriol’, rakonto pri alveno de Stefan en Malezion (ŝajne la unua parto) kaj fine Martusia kun Goŝka ME priparolas la reagojn.
La elsendo konsistas el du partoj (por pli facile elŝuti la tutan programon), ĝi elŝuteblas mp3-forme kaj aŭskulteblas ankaŭ rekte ĉe la podkasta paĝo
[http://www.facebook.com/l/8bef9zioit7960KYorti12Ab8UQ;www.podkasto.net](http://www.facebook.com/l/8bef9zioit7960KYorti12Ab8UQ;www.podkasto.net).
Bonan aŭskultadon, karaj! Irek

### Nova libro pri esperanto hispanlingve

Al nia kolegaro, saluton:

Kiel anoncite jam estas aldoninta la unua libro de la Biblioteca de la Escuela Argentina de Esperanto (hispanlingve)

1.- Sartor-Battig, Esperanto, una cura para las heridas de Babel.

2.- Jorge Hess. ¿Sabe Ud. Esperanto?

3.- Diccionario Esperanto-Español. Español Esperanto.

4.- A. López Luna. Zamenhof, iniciador del Esperanto.

kies celo estas doni al AEL kaj argentina E-Movado taŭgain manlibrojn por instrui kaj disvastigi la internacian lingvon. Novaj libroj au reeldonoj estas bezonantaj ĉefe por la anoncita E-katedro en la Universitato de La Plata, kaj ĉien kie ni organizas E-novajn kursojn, kunvenojn, kongresojn ktp..

La profitoj eltirontaj el la vendado de la libroj estas tute deponontaj en la Bankkonto de AEL-LEA. Do des pli da libroj estas vendotaj pli da mono estos disponebla por la agado de AEL....ĉefe por la kandidatiĝo por estonta UKo.

La eldonisto uzas la novan sistemon DEAUNO.COM kaj oni aĉetos la librojn rekte pere de interreto ĉe: http://www.elaleph.com/libro/Esperanto-Una-cura-para-las-heridas-de-Babel-de-R-Sartor-A-Battig/247047.

Roberto Sartor, Kunaŭtoreditoro, rosartoro ĉe gmail.com, jarlibro paĝo 101, SAT N° 35141

### [instru-german] Kongresa Universitato invitas prelegontojn

*Malsukcesa elŝuto.*

### FACEBOOK-PAĜO DE UEA 1-JARIĜIS

Universala Esperanto-Asocio malfermis propran paĝon en la socia retejo Facebook la 8-an de novembro 2009. Je sia unua datreveno ĝi havis 1738 amikojn, kies laŭlanda distribuo estas sufiĉe alia ol tiu de la individuaj membroj de UEA. La unuan lokon okupas, kun distanco, la hejmlando de Facebook, Usono, kiu inter la individuaj membroj havas la kvinan pozicion. La plej granda lando inter la individuaj membroj estas Francio, kiu en la Facebook-paĝo estas tria. Rimarkindaj kazoj estas Meksiko, kiu en la IM-statistiko estas 31-a kaj en Facebook 8-a, kaj ankaŭ Argentino (respektive 39-a kaj 9-a) kaj Ĉilio (57-a kaj 11-a). Pleje tamen elstaras Malajzio, kie UEA havas nur unu membron sed 50 amikojn de sia Facebook-paĝo. Legu pli: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 401, 2010-11-08

### Ĵusa apero de du novaj albumoj ĉe Vinilkosmo

Trajn' nenien - DOLCHAMAR
La 3a tutesperanta albumo de Dolchamar "Trajn' nenien". Tiu KD estas disponebla en la reta diskoservo de Vinilkosmo ĉe : http://www.facebook.com/l/2017e6PeP0246Hvvuwnj2si2uYQ;www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd102&lng=e kaj elŝutebla ĉe: http://www.facebook.com/l/2017eKZwwVx4S_j621DAHY2CU3Q;www.vinilkosmo-mp3.com/dolchamar-c-74_98.html?language=eo
"Urbano" - inicialoj dc :
La Oficiala apero de la unua tutesperanta albumo "Urbano " de inicialoj dc okazis dum F.A.M. en Tuluzo (kun koncerto la 7an /11/2010 en Mandala). Tiu KD estas disponebla en la reta diskoservo de Vinilkosmo ĉe :http://www.facebook.com/l/2017ee-rxHd7D7-pVLstzdlq-aw;www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd103&lng=e kaj elŝutebla ĉe / Download : http://www.facebook.com/l/2017epriQ2V9X2spMdBYZ64-rQA;www.vinilkosmo-mp3.com/inicialoj-c-74_161.html?language=eo

### GK: Organizita E@I 5-jariĝas, kun novaj projektoj kaj staĝanto

Gazetara komuniko de E@I. En Bratislavo kaj Nancio, 2010-11-14.
Plena teksto kun bildoj kaj PDF-versio: http://tinyurl.com/echei5
Antaŭ 5 jaroj, la 14-an de novembro 2005, estis ĉe la Ministerio de internaj aferoj de la Slovaka respubliko registrita senprofita neregistara junulara organizo E@I (elparolu "e-ĉe-i").

### Zamenhofa festo 10.12.2010, Appenweier, Germanio

Esperanto grupestro Engelbert nun informas vin ke ni solena festos Zamenhofan datrevenon estas iomete antauen, sed ni ne trovis alian daton. Do nun vi estas ĉiuj tre kore kun geamikoj invitata Vendrede, 10.Decembro 2010 vespere je la 18.30 Horo en gastejo de greka Patmos - en la ĉefstrato, aliflanke de policejo en 77767 Appenweier – Germanio. Nun ĉe la policejo estas sufiĉe da parkejoj por aŭtomobiloj. Al tiamanan vesperon mi invitis la gazetredaktorino Sinjorino Sigrid Hafner. Ŝi donis ankaŭ al mi la impulson fari aŭ organizi renkontiĝon. Tie en Appenweier mi trovis la bonan taŭgan lokon. Mi esperas ke multe povas partopreni kaj sin aliĝu, ke ni ĝojplenan belan vesperon travivos.

Kore salutas

Engelbert Sester, Esperanto-Grupo Oberkirch

### [DEJ] 2-a Novjara Internacia Semajno, 27-a de dec. ghis 3-a de jan. en Saarbrücken

Saluton!
Ĉi-jarfine denove EsperantoLand ofertos Novjaran Internacian Semajnon (NIS) en Saarbrücken, ĉe la limo de Francio kaj Germanio. Ĝi celas al junuloj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj ŝatas festi ĉe la okcidenta flanko de Germanio, apud Francio. NIS estas parto de la 9-a Novjara Renkontiĝo kaj eblas viziti ties programerojn.
La programo enhavos interalie diskotekon, kiun aranĝos Erik Frense, kaj estos koncertoj de Xavier Rodon Morera kaj de Kim Henriksen. Pliaj programeroj aldone al la ofertoj de NR (vidu che http://www.esperantoland.de/nr/index.shtml#programo ) dependas de la intereso de la partoprenontoj.
La plimulton de la ĝisnunaj aliĝintoj vi povas vidi ĉe http://www.esperantoland.de/nis/partoprenantoj_nis2.php .
Eble ankaŭ vi ŝatos festi jarfine en Saarbrücken, ĉu? Venu - ni ĝojos vidi vin!
IS kaj AS, JES kaj NIS
Belan festadon en JES por la partoprenontoj kaj eble ĝis (re)vido en Saarbrücken, Lu.
http://www.esperantoland.org

### 10. Venontaj renkontiĝoj

Hanojo bonvenigas vin por la Komuna Semajno!, 18a – 20a de Decembro 2010, Hanojo, Vjetnamio, http://tejo.org/eo/KS2010

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

JES 2010, 27-a de decembro 2010 ĝis la 2-a de januaro 2011 http://jes.pej.pl/

28.12.2010 - 02.01.2011 SANO-1, Herzberg, Germanio http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=62498645

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO – 2011, 26-a de februaro ĝis 5-a de marto 2011 Agay - Francio - Lazura Marbordo Monique Prezioso, 92 alleé des Harkis, FR 83700 Saint-Raphael, Francio, rete: prezmoni ĉe hotmail.com; tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progres, FR 83600 Frejus, Tel. 0033(0)494956618

27a Printempa Semajno Internacia, 22a ĝis 29a de aprilo 2011 en Waldfischbach-Burgalben, Germanio http://www.esperanto.de/psi;

Torino 2011 - Nacia kongreso inter historio kaj pasio, inter la 20a kaj la 26a de Augusto 2011, Italio http://italakongreso.esperantoitalia.it/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### [baveleto] publika honorigo de Zsofia Korody el Herzberg - la Esperanto-urbo

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg (ICH), DE-37412 Herzberg - la Esperanto-urbo
26.10.2010
Karaj,
estas granda ĝojo komuniki al vi, ke Zsofia Korody el Herzberg dum solena festo en la kavalira salono de la kastelo Herzberg am Harz ricevis publikan distingon por la pli ol sepjara honorofica aktiva agado sur la diversaj kampoj por Esperanto kaj la oficiala Esperanto-urbo Herzberg.

Urbestro Gerhard Walter emfazis la multflankan kaj senlacan agadon, ekz. por la GEA-filio por klerigado kaj kulturo, kiel prezidantino de AGEI, kiel komisiitino de GEA por instruado, organizantino por internaciaj lernejaj projektoj, por la sukcesaj ĝemelurbaj aktivecoj inter Herzberg kaj Gora/PL, pro la meritoj rilate al la enkonduko de Esperanto-ekzamenoj lau KER, kiel estrarano de ILEI, por la granda Esperanto-biblioteko en Herzberg, ktp.
La ĉefo de la Esperanto-urbo aparte dankis al Zsofia Korody kaj transdonis gratuldokumenton kaj ombrelon kun la bela surskribo "Herzberg ... la Esperanto-urbo". Ĉeestis nemalmultaj poltikistoj kaj reprezentantoj de aliaj asocioj kaj kulturgrupoj.
Gerhard Walter substrekis la valoron "Esperanto" por Herzberg kaj anoncis akceladon de la poresperantaj agadoj.
Jen bonaj ekzemploj: baldaua fondo de speciala Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg, starigon de tiel nomataj "kontinentaj Esperanto-domoj", ekz. "Azia Esperanto-domo".
Do, tio estas belaj kaj realigendaj paŝoj en ne tro fora futuro. Bv. serioze kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg!
Ni elkore gratulas al Zsofia Korody kaj deziras al ŝi bonan sanstaton, feliĉon kaj pluajn sukcesojn "sur la vere esperiga verda pado".
En la aldono vi trovas fotojn sub: [http://esperanto-urbo.de](http://esperanto-urbo.de) kaj tie sub: fotogalerio/j
Intertempe ankaŭ aperis gazetartikolo pri la honoriga evento, ankaŭ tio jam videblas sur nia hejmpaĝo!
Dankon!
Amike kaj samideane salutas, Petro Zilvar el Herzberg Harald Mantz el Osterode

### La 63a elsendo de Varsovia Vento

Saluton! Kun plezuro mi invitas vin aŭskulti la novan programon, en kiu inter alie sonraportoj pri la Tago de Diverseco en Varsovio kaj pri la Homara Festo en Francio, tre interesa intervjuo kun la aŭtoro de "La danĝera lingvo" Urlich Lins, muzika intervjuo kun Kapriol', rakonto pri alveno de Stefan en Malezion (ŝajne la unua parto) kaj fine Martusia kun Goŝka ME priparolas la reagojn.
La elsendo konsistas el du partoj (por pli facile elŝuti la tutan programon), ĝi elŝuteblas mp3-forme kaj aŭskulteblas ankaŭ rekte ĉe la podkasta paĝo
[http://www.facebook.com/l/8bef9zioit7960KYorti12Ab8UQ;www.podkasto.net](http://www.facebook.com/l/8bef9zioit7960KYorti12Ab8UQ;www.podkasto.net).
Bonan aŭskultadon, karaj! Irek

### Nova libro pri esperanto hispanlingve

Al nia kolegaro, saluton:

Kiel anoncite jam estas aldoninta la unua libro de la Biblioteca de la Escuela Argentina de Esperanto (hispanlingve)

1.- Sartor-Battig, Esperanto, una cura para las heridas de Babel.

2.- Jorge Hess. ¿Sabe Ud. Esperanto?

3.- Diccionario Esperanto-Español. Español Esperanto.

4.- A. López Luna. Zamenhof, iniciador del Esperanto.

kies celo estas doni al AEL kaj argentina E-Movado taŭgain manlibrojn por instrui kaj disvastigi la internacian lingvon. Novaj libroj au reeldonoj estas bezonantaj ĉefe por la anoncita E-katedro en la Universitato de La Plata, kaj ĉien kie ni organizas E-novajn kursojn, kunvenojn, kongresojn ktp..

La profitoj eltirontaj el la vendado de la libroj estas tute deponontaj en la Bankkonto de AEL-LEA. Do des pli da libroj estas vendotaj pli da mono estos disponebla por la agado de AEL....ĉefe por la kandidatiĝo por estonta UKo.

La eldonisto uzas la novan sistemon [DEAUNO.COM](DEAUNO.COM) kaj oni aĉetos la librojn rekte pere de interreto ĉe: [http://www.elaleph.com/libro/Esperanto-Una-cura-para-las-heridas-de-Babel-de-R-Sartor-A-Battig/247047](http://www.elaleph.com/libro/Esperanto-Una-cura-para-las-heridas-de-Babel-de-R-Sartor-A-Battig/247047).

Roberto Sartor, Kunaŭtoreditoro, rosartoro ĉe gmail.com, jarlibro paĝo 101, SAT N° 35141

### [instru-german] Kongresa Universitato invitas prelegontojn

*Malsukcesa elŝuto.*

### FACEBOOK-PAĜO DE UEA 1-JARIĜIS

Universala Esperanto-Asocio malfermis propran paĝon en la socia retejo Facebook la 8-an de novembro 2009. Je sia unua datreveno ĝi havis 1738 amikojn, kies laŭlanda distribuo estas sufiĉe alia ol tiu de la individuaj membroj de UEA. La unuan lokon okupas, kun distanco, la hejmlando de Facebook, Usono, kiu inter la individuaj membroj havas la kvinan pozicion. La plej granda lando inter la individuaj membroj estas Francio, kiu en la Facebook-paĝo estas tria. Rimarkindaj kazoj estas Meksiko, kiu en la IM-statistiko estas 31-a kaj en Facebook 8-a, kaj ankaŭ Argentino (respektive 39-a kaj 9-a) kaj Ĉilio (57-a kaj 11-a). Pleje tamen elstaras Malajzio, kie UEA havas nur unu membron sed 50 amikojn de sia Facebook-paĝo. Legu pli: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 401, 2010-11-08

### Ĵusa apero de du novaj albumoj ĉe Vinilkosmo

Trajn' nenien - DOLCHAMAR
La 3a tutesperanta albumo de Dolchamar "Trajn' nenien". Tiu KD estas disponebla en la reta diskoservo de Vinilkosmo ĉe : http://www.facebook.com/l/2017e6PeP0246Hvvuwnj2si2uYQ;www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd102&lng=e kaj elŝutebla ĉe:
http://www.facebook.com/l/2017eKZwwVx4S_j621DAHY2CU3Q;www.vinilkosmo-mp3.com/dolchamar-c-74_98.html?language=eo
"Urbano" - inicialoj dc :
La Oficiala apero de la unua tutesperanta albumo "Urbano " de inicialoj dc okazis dum F.A.M. en Tuluzo (kun koncerto la 7an /11/2010 en Mandala). Tiu KD estas disponebla en la reta diskoservo de Vinilkosmo ĉe :http://www.facebook.com/l/2017ee-rxHd7D7-pVLstzdlq-aw;www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd103&lng=e kaj elŝutebla ĉe / Download : http://www.facebook.com/l/2017epriQ2V9X2spMdBYZ64-rQA;www.vinilkosmo-mp3.com/inicialoj-c-74_161.html?language=eo

### GK: Organizita E@I 5-jariĝas, kun novaj projektoj kaj staĝanto

Gazetara komuniko de E@I. En Bratislavo kaj Nancio, 2010-11-14.
Plena teksto kun bildoj kaj PDF-versio: http://tinyurl.com/echei5
Antaŭ 5 jaroj, la 14-an de novembro 2005, estis ĉe la Ministerio de internaj aferoj de la Slovaka respubliko registrita senprofita neregistara junulara organizo E@I (elparolu "e-ĉe-i").

### Zamenhofa festo 10.12.2010, Appenweier, Germanio

Esperanto grupestro Engelbert nun informas vin ke ni solena festos Zamenhofan datrevenon estas iomete antauen, sed ni ne trovis alian daton. Do nun vi estas ĉiuj tre kore kun geamikoj invitata Vendrede, 10.Decembro 2010 vespere je la 18.30 Horo en gastejo de greka Patmos - en la ĉefstrato, aliflanke de policejo en 77767 Appenweier – Germanio. Nun ĉe la policejo estas sufiĉe da parkejoj por aŭtomobiloj. Al tiamanan vesperon mi invitis la gazetredaktorino Sinjorino Sigrid Hafner. Ŝi donis ankaŭ al mi la impulson fari aŭ organizi renkontiĝon. Tie en Appenweier mi trovis la bonan taŭgan lokon. Mi esperas ke multe povas partopreni kaj sin aliĝu, ke ni ĝojplenan belan vesperon travivos.

Kore salutas

Engelbert Sester, Esperanto-Grupo Oberkirch

### [DEJ] 2-a Novjara Internacia Semajno, 27-a de dec. ghis 3-a de jan. en Saarbrücken

Saluton!
Ĉi-jarfine denove EsperantoLand ofertos Novjaran Internacian Semajnon (NIS) en Saarbrücken, ĉe la limo de Francio kaj Germanio. Ĝi celas al junuloj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj ŝatas festi ĉe la okcidenta flanko de Germanio, apud Francio. NIS estas parto de la 9-a Novjara Renkontiĝo kaj eblas viziti ties programerojn.
La programo enhavos interalie diskotekon, kiun aranĝos Erik Frense, kaj estos koncertoj de Xavier Rodon Morera kaj de Kim Henriksen. Pliaj programeroj aldone al la ofertoj de NR (vidu che
http://www.esperantoland.de/nr/index.shtml#programo ) dependas de la intereso de la partoprenontoj.
La plimulton de la ĝisnunaj aliĝintoj vi povas vidi ĉe http://www.esperantoland.de/nis/partoprenantoj_nis2.php .
Eble ankaŭ vi ŝatos festi jarfine en Saarbrücken, ĉu? Venu - ni ĝojos vidi vin!
IS kaj AS, JES kaj NIS
Belan festadon en JES por la partoprenontoj kaj eble ĝis (re)vido en Saarbrücken, Lu.
http://www.esperantoland.org

## 10. Venontaj renkontiĝoj

Hanojo bonvenigas vin por la Komuna Semajno!, 18a – 20a de Decembro 2010, Hanojo, Vjetnamio, http://tejo.org/eo/KS2010

9-a Novjara Renkontiĝo (NR), 27a de dec. 2010 - 3a de jan. 2011 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nr/;

2-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj (ĉ. 14 - 30jaraj) 27-a de dec. 2010 - 3-a de jan. 2011 en Saarbrücken http://www.esperantoland.org/nis/;

JES 2010, 27-a de decembro 2010 ĝis la 2-a de januaro 2011 http://jes.pej.pl/

28.12.2010 - 02.01.2011 SANO-1, Herzberg, Germanio http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=62498645

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO – 2011, 26-a de februaro ĝis 5-a de marto 2011 Agay - Francio - Lazura Marbordo Monique Prezioso, 92 alleé des Harkis, FR 83700 Saint-Raphael, Francio, rete: prezmoni ĉe hotmail.com; tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progres, FR 83600 Frejus, Tel. 0033(0)494956618

27a Printempa Semajno Internacia, 22a ĝis 29a de aprilo 2011 en Waldfischbach-Burgalben, Germanio http://www.esperanto.de/psi;

Torino 2011 - Nacia kongreso inter historio kaj pasio, inter la 20a kaj la 26a de Augusto 2011, Italio http://italakongreso.esperantoitalia.it/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu